# Adiaŭ, Julio!

La aferoj de la esperantista movado marŝas per la piedoj de sindonemaj aktivuloj, kiuj dediĉas sian tempon kaj laboron al la necesaj taskoj por la propagando, instruado kaj disvastigado de la internacia lingvo. Malfeliĉe tiaj homoj, ĉiam malabundaj, en iuj epokoj, bedaŭrinde, preskaŭ tute mankas. Hodiaŭ ni devas dediĉi specialan memoron al iu el tiaj homoj okaze de lia forpaso.

La 30an de pasinta monato oktobro mortis samideano Julio Argüelles. Dum kelkaj jardekoj li membris kaj aktivadis en la organizaĵoj de la esperantista movado en Gijón, unue en la Esperantista Grupo Jovellanos kaj poste en Astura Esperanta Asocio. Ofte li partoprenis en la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj raportis pri tiuj forumoj por la presorgano de nia E-rondo, HELECO. Krom tio, li kelkfoje havis respondecojn en la komitato de la grupo, kaj gvidis kursojn de Esperanto en publikaj lernejoj de la urbo.

Sed la ĉefa lia aktivado disvolviĝis en la organizaj taskoj de nia E-grupo. Li estis nelacigebla demarŝanto de tiuj aferoj, kiuj postulis dediĉon, interrilatadon kun burokrataraj instancoj, ekzemple por organizado de la bankedoj kaj aliaj festaj aktoj de la esperantistaj festoj, luado de aŭtobusoj por ekskursoj kaj serĉado de gastejoj por kongresanoj, ofta deĵorado en la stando de nia E-Asocio ĉe la urba foirejo kaj en la Festoj de la Lingvoj en nia urbo… Al tiu speciala lerteco de samideano Julio por tiaspecaj taskoj dediĉis Alcibiades G. Meana, antaŭ kelkaj jaroj, iun akrostikon, kiun ni prenis el la HELECO-kolekto por ĉi modesta omaĝo.

Kun la malapero de Julio nia E-Asocio perdas iun el siaj plej aktivaj membroj; lia por-Esperanta agado dum tiom da jaroj devas esti por ni stimulo, instigo kaj imitinda ekzemplo cele de ke ne manku en nia urbo la volonteca sindediĉo al la Granda Ideo de Zamenhof.



**J**u pli li laboras, des pli li mirigas,
**U**nika li estas por iu ajn tasko.
**L**erteco simila nin ĉiujn instigas
**I**miti lin ĉiam (Por nia fiasko!!).
**O**bstakloj forestas en lia laboro.

**A**ktivas li ĉie efike sen peno.
**R**eale, li vivas en daŭra deĵoro,
**G**iganta vigleco, sindona sinteno,
**U**tilon donanta al nia movado.
**E**kzemplo li estas de samideano
**L**uktanta por venki, per digna strebado,
**L**a barojn survoje al paca lontano.
**E**kkriu, honore al tia agado:
**S**aluton, amiko de tre lerta mano!!